



Murray Bookchin



## **ROJAVO: LUKTO KUN LIBERECANA SUBSTRATO**

En julio 2006-a forpasis Murray Bookchin. Inter la mesaĝoj lanĉitaj memore al la grava liberecana teoriulo estis unu, kiu povus surprizi tiujn, kiuj havis nur supraĵan konon pri la kurda afero kaj ties kontraŭimperiisma lukto.

La PLK<sup>(1)</sup> esprimis, antaŭ la morto de Bookchin, sian agnoskon pri li kiel “unu el la plej grandaj sociaj sciencistoj de la XX-a jarcento”. La PLK agnoskis la kontribuon, kiun liaj ideoj faris al la disvolviĝo de la socialisma teorio, kaj esprimis, ke liaj “tezoj pri la Ŝtato, la povo kaj la hierarkio estos plenumitaj kaj realigitaj pere de nia lukto”, kaj sekvante tiujn ideojn la PLK promesis efektiviĝi praktike la demokratian konfederaciismon.

Kio okazis por ke, de la unuaj tekstoj citantaj Stalinon, Leninon aŭ Maŭnon, nun la emfazon oni metas je la liberecano Murray Bookchin?

En la jaro 1978-a estis fondita, en la teritorio de Kurdio sub turka dominado, la Partio de la Laboristoj de Kurdio. Tiu ĉi politika organizaĵo naskiĝis kun tre klaraj ideoj: la starigo de sendependa kaj socialisma Kurda Ŝtato. Per siaj unuaj dokumentoj la PLK esprimis tiun idearon. En ties “Manifesto” la PLK difinis sin kiel “politikan organizaĵon sub la gvido de la scienca socialismo” kaj -eĉ se kritikema rilate iujn politikojn de la tiama Sovetunio, kiujn ĝi konsideris oportunismaj kaj reviziismaj- montris sin partiano de la lukto socialisma kaj naciliberiga sub la aŭspicio de tiu Sovetunio.

Sed la disvolviĝo, jen de la lukto, kiun la PLK efektivigis, jen de la ŝanĝoj en la internacia geopolitiko, efikis profunde sur la programo kaj la strukturo de la kurda partio. Malsame al aliaj politikaj movadoj, la PLK kapablis fari kritikan pritakson de la realeco, la partio kapablis analizi la okazintaĵojn ĉirkaŭ la sovetia sistemo kaj la ideoj de la reala socialismo kaj de la liberigmovadoj. En tiu senco la Parti-Kongreso de 1995-a ekzempligis unuafoje, laŭ plej evidenta maniero, la okazintajn ŝanĝojn. La rezolucio de tiu Kongreso jam kvalifikis la epokon de la socialismo sub sovetia influo kiel fazon de “socialismo primitiva kaj bruteca” kaj pledis por nova periodo en la porsocialisma lukto. Ne nur tio, ĉar la forlaso de la flago kun la serpo kaj martelo kaj la anstataŭigo de la “Centra Komitato” per la “Asembleo de la Partio” evidentigis tiun evoluoprocezon en la konceptado pri la socialismo de la kurda liberigmovado.

Sed la plej gravaj ŝanĝoj alvenis fine de la 90-aj jaroj. La ideologia evoluoprocezo de la partio daŭris, ĉefe de la mano de ties kapo Abdullah Öcalan, kaj lia aresto en 1999-a estis mejloŝtona en la historio de la kurda liberigmovado.



La novan situacion profitis Öcalan kiel spacon por intertrakti kun la turka registaro kaj, samtempe, li estis laŭtparolilo por la novaj ideoj, kiuj estis disvolviĝantaj en la PLK kaj super kiuj Öcalan estis laboranta. La defenddokumentoj, kiujn la PLK-gvidanto ellaboris, estis historia kaj politika analizoj, kiuj ekdisvolvigis la novan paradigmon de la kurda liberigmovado.

Sed ankoraŭ pasis kelkaj jaroj, antaŭ ol la nova teoria framo estis plene disvolvigita kaj maturigita fare de Abdullah Öcalan. Inter 1999-a kaj 2004-a, kiam firmiĝas kaj la novaj ideoj kaj la nova strukturo de la kurda liberigmovado, aperis grava elemento, kiu ebligis, ke ĝuste la nova paradigmo de la kurda movado disvolviĝis tiel, kiel ni ĝin konas nun.

En 2002-a Öcalan komencis studi la verkaron de Bookchin, trovante en ĝi grandan inspiron kaj rekomendante ĝian legadon al la kurdaĵ aktivuloj kaj politikistoj. Kaj jam en 2004-a Öcalan esprimas sin klare rilate sian afinecon kun la ideoj disvolvigitaj de Bookchin en ties verkaro. Nur unu jaron poste la nova idearo de la kurda liberigmovado estis matura kaj oni lanĉis ĝin oficiale kaj paralele al la organiza restrukturado de la movado.

La 20-an de Marto 2005-a estis anoncita la starigo de la *Koma Komalen Kurdistan* (kiu estis poste rebaptita kiel *Koma Civakên Kurdistan*(2)), kaj la demokrata konfederaciismo estis difinita kiel la idearo de tiu ĉi nova organizo kaj la modelo por la liberigo de la kurda popolo kaj la aliaj popoloj de Mezoriento.

La demokrata konfederaciismo estis jam kompleta sistemo, kiu finis tiun proceson de ŝanĝoj kaj la stagnadon, en kiuj troviĝis same la idearo kiel la strukturo de la PLK, kaj komenciĝis nova epoko stampita de tiu ĉi nova paradigmo.

La demokrata konfederaciismo ne interpretas la rajton je memdeterminado de la popoloj kiel la rajton por starigo de kurda naci-ŝtato, sed konsideras, ke io tia ne farus pli ol “anstataŭigi la malnovajn katenojn per novaj”. Fronte al tio oni proponas modelon de memregado konstruita sur “la memmastrumado de la lokaj komunumoj organizitaj laŭ malfermaj konsilantaroj [...]”. La civitanoj mem estas la rolantoj en tia regado, ne la ŝtata aŭtoritato”, kiel ĝin esprimas Öcalan.



Kiel integra propono por socia liberigo, la demokrata konfederaciismo havas tre fortan kontraŭkapitalisman karakteron. En sia opozicio je la kapitalisma ekonomio ĝi proponas ekonomian sistemon bazitan sur la “ekologiaj kaj ekonomiaj komunumoj”, bazoj por la kreo de ekonomia sistemo, kiu funkcio por respondi la bazajn bezonojn de la socio kaj ne por atingi profitojn, kaj kiu kapablos protekti la medion. La graveco krei ekologian socion estas alia piliero de la demokrata konfederaciismo kaj estas klara pruvo de la influo de Bookchin sur ĝi.

Laste, el tiuj rimarkindaj pilieroj oni devas paroli pri la ina liberigo. La memorganizado de la virinoj ene de la movado estas fundamenta elemento, kaj la lukto kontraŭ la patriarĥeco estas fundamenta parto de la programo de la kurdaj revoluciuloj, kiel diras Öcalan: “sen la libera virino ne povas esti libera Kurdio”.



En la kvar regionoj de Kurdio la liberigmovado batalas por konstrui liberan socion. Norda Kurdio<sup>(3)</sup> kaj Roĵavo<sup>(4)</sup> estas la du plej klaraj ekzemploj, kie, spite la fortan subpremado kaj la militon, la demokrata konfederaciismo funkcias.

La kurda revolucia movado kune kun ties frataj popoloj donas lecionon al la mondo. La demokrata moderneco fronte al la kapitalisma moderneco. Fronte al la historio de okupacio, koloniismo kaj invado- la kurda popolo estas konstruanta socion demokratan, egalecan kaj liberan.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj)

- (1) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (2) Konfederacio de la Popoloj de Kurdio (KPK)/Koma Civakên Kurdistan (KCK).
- (3) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (4) Okcidenta Kurdio/Rojavayê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la siria ŝtato.

#### KLARIGOJ:

Originala artikolo: J. Martínez (Solidaridad Kurdistan). Aperinta en la ĵurnalo *CNT*, n-ro: 416. Feb. 2015-a.

El la blogo “Rojava no está sola”. Tradukis NXC. Aŭgusto 2015-a.

